**Trejnilo de Esperanta Leksiko**
Prilaboris: **Ryszard Rokicki**

# TESTO 15

## **Ekzerco 1.** Kompletigu la vortspacon.

**1.** Pli bona apude **n ␣ j ␣ ␣ r ␣** ol frato post arbaro.

**2.** Vulpo **m ␣ ␣ n ␣ ␣** ŝanĝas, sed plue kokidojn manĝas.

**3.** Se ĉiu **b ␣ l ␣ ␣ ␣** antaŭ sia pordo, tiam en la tuta urbo estos ordo.

**4.** Al tiu ĉio cedas, kiu monon **␣ ␣ s ␣ d ␣ ␣**.

**5.** Temas pri malgranda plasta ilujo enhavanta etan malmunteblan **␣ r ␣ s ␣ ␣** kaj dentopaston.

**6.** Nuntempe, kiam Eŭropo unuiĝas kaj tutmondiĝo forigas **b ␣ r ␣ ␣ ␣** inter nacioj, la lingva problemo ankoraŭ akre manifestiĝas.

**7.** Komence multaj eminentaj sciencistoj ne kredis al Avery, kvankam li estis **␣ ␣ c ␣ ␣ nc ␣** sciencisto kaj atentis ĉiun detalon.

**8.** Ŝia mano nevole etendiĝis al la **␣ r ␣ nt ␣** de la dormanta junulo kaj ŝi tenere lin karesis.

**9.** Leĝo pri politikaj partioj estis unualege **␣ pr ␣ b ␣ t ␣** de ĉ. 95 % de la deputitoj de la suba ĉambro de la hispana parlamento.

**10.** Se nilono kunglaciiĝas kun la **␣ ␣ ŭ␣ ␣**, ĝi iĝas nedisigebla kaj rezultigas amputadon de la koncerna korpoparto.

## **Ekzerco 2.** Finskribu ĝustan vorton.

**1.** En la "Proksima **O␣ ␣ ␣ nt ␣**", precipe en Israelo kaj Libano, la plej fruaj trovejoj aĝas preskaŭ 100 000 jarojn, en suda Eŭropo kaj centra Azio ĉ. 40 000 jarojn.

**2.** En la 1850aj jaroj Meïr Aron Goldschmidt eldonis alian (sensukcesan) ĵurnalon ***N* ␣ *r* ␣ ␣** *kaj Sudo*, kiun li plenigis preskaŭ sole.

**3.** La instruistoj aldonis, ke la **c ␣ f ␣ r ␣ ␣** en „$\pi$" sekvas sin seninterrompe kaj sen ripeti sin.

**4.** Stetten venis en la loĝejon de sia amiko, li mirante lin vidis vestitan en nigra surtuto kun **k ␣ ␣v␣ t ␣** kaj gantoj blankaj.

**5.** Plej multe vidindas la baroka centro de la urbo, atestanta pri la **d ␣ l ␣ k ␣ t ␣** artosento de la iama riĉa burĝaro.

**6.** Do, jen riboj, vulgaraj beroj, **t ␣ ŭ␣ ␣ ␣** por fari konfitaĵon, fruktokaĉon kaj vinon.

**7.** Unu advokato, tre malgranda, venis juĝejon, por **d ␣ f ␣ n ␣ ␣** la aferon de sia kliento.

**8.** Se la fundo estus plata, tiam ĉe ĉiu leviĝo de la ŝipo ĉiuj poŝtaĵoj elfalus el la diversaj fakoj, la objektoj denove **m ␣ ks ␣ ĝ ␣ ␣** inter si, kaj la tuta laboro estus vana.

**9.** En tia Eŭropo ne-EU-anoj devos **o**␣ **e** ␣ al ĉiam pli striktaj reguloj enmigradaj.
**10.** Ĝenaĵoj en somerdoma feliĉo estas kuloj, **m** ␣ **ŝ** ␣ ␣, formikoj kaj foje tabanoj.

## **Ekzerco 3.** Kreu el la radikoj ĝustan vorton kaj enskribu ĝin.

fakt', fleg', diferenc', bedaŭr', merit', akompan', vund', buton', legom', nep'.

**1.** Jula surhavis nigran jupon, helbluan bluzon kaj nigran mantelon, kiu ne estis ␣ ␣ ␣ ␣ **n** ␣ **m** ␣ **t** ␣.
**2.** Niaj nepoj kaj ␣ ␣ **p** ␣ **n** ␣ ␣ pagos por tio, kion niaj regantoj okazigas al ni en la Balkana Duoninsulo.
**3.** Ni sidas silente, ĉi tie estas fruktoĝardenoj, ␣ ␣ ␣ ␣ **m** ␣ **j** ␣ ␣, oceanoj de verdaĵo kaj floroj.
**4.** Ĉio, kion mi enlistigis ĉi-rilate, konsistigas pruveble veran ␣ ␣ **k** ␣ ␣ **r** ␣ ␣.
**5.** La ĉefministro Helen Clark elpostenigis la ministron, ne volante, ke ŝia programo por helpi la plej ␣ ␣ ␣ **d** ␣ ␣ **l** ␣ ␣ ␣ homojn en la socio elreliĝu.
**6.** La reĝino penis konvinki sian filon, ke li ne ĉasu en la sorĉita arbaro, sed li insistis kaj forrajdis kun granda ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ **n** ␣ ␣ ␣ ␣ **r** ␣.
**7.** Etaj mankoj de la libreto tute ne dependas de la aŭtorino, la ĉefa ␣ ␣ ␣ ␣ **ŭ** ␣ ␣ ␣ **d** ␣ **ĵ** ␣ estas bela, sed neoportuna litertipo – kelkaj literoj tre similas unu la alian.
**8.** La eco de la diamantoj, montrita de Kunz, povas doni utilan pruvilon ĉe ␣ ␣ **f** ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ **g** ␣ ␣ ␣ de briliantoj veraj de malveraj.
**9.** Certe Esperanto ␣ ␣ **ŭ**␣ ␣ **r** ␣ ␣ ␣ senkonkurence nun dominas sur la fundamentoj faritaj de Volapuko kaj sur ties provo pri la efikeco de lingvo konstruita.
**10.** Oskar rakontas al sia ␣ ␣ ␣ **g** ␣ ␣ **t** ␣ en iu svisa sanatorio la historion de sia vivo.

## **Ekzerco 4.** Marku taŭgan vorton:

**1.** Oni honoris Pentueron ne nur tial, ke li estis la konsilisto de la milita ministro kaj malgraŭ la juna aĝo ano de la plej alta kolegio, sed ĉar li estis ___ en la tuta Egipto.
**a.** fama **b.** densa **c.** pacienca **d.** ĝenerala
**2.** Por ne enui, ili desegnis sur lignan bufedan tablon damludan ___ kaj ludis damojn.
**a.** poton **b.** lampon **c.** tabulon **d.** prezon
**3.** Inter pli malfruaj inventoj de la stepanoj (cetere, ligitaj al rajdado) menciindas la ___, la jako, la piedingoj, la sabro.
**a.** krimo **b.** ĉapitro **c.** pantalono **d.** leciono

**4.** La paco estas produkto de leĝaro, kiu estas esenca ___, por ke la potenco de armiloj ne regu la mondon.

**a.** karbo **b.** flago **c.** kondiĉo **d.** doktoro

**5.** La Komodo-varano havas mezlongajn krurojn kun longaj ___, longajn voston kaj kolon.

**a.** ungoj **b.** maŝinoj **c.** pantalonoj **d.** keloj

**6.** Ambaŭ liaj kruroj estas kovritaj de blankaj, kirurgaj ___ por egale subteni la sangopremon, pro la vundo en la maldekstra.

**a.** sezonoj **b.** ostoj **c.** ŝtrumpoj **d.** retoj

**7.** Bush kaj kompanoj eĉ ne hontas prezenti ___ dokumentojn por pravigi militon kontraŭ Irako.

**a.** avarajn **b.** platajn **c.** subitajn **d.** falsitajn

**8.** En la sendependiĝinta Irlando, oni ___ pri militservo de irlandaj junuloj en britaj surteraj trupoj.

**a.** blovis **b.** plugis **c.** hontis **d.** streĉis

**9.** La publiko indignegas, ĉar advokatoj de ordinaraj akuzitoj ne rajtas elekti aŭ ___ ĵurianojn por proceso, en kiu ili estas implikitaj.

**a.** kombi **b.** spezi **c.** ŝoveli **d.** rifuzi

**10.** Filipo salte stariĝis kaj ___ siajn okulojn: antaŭ li staris vicpolicestro.

**a.** viŝis **b.** meritis **c.** komparis **d.** mensogis